

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*



Monda Sociala Forumo en Dakaro



kaj ni, kaj ni...



Grava renkontiĝo

La Monda Sociala Forumo certe estis kaj estos grava renkontiĝo por tiuj homoj, kiuj esperas kaj agadas por pli justa mondo. Tiu Forumo ebligas ideointerŝanĝojn abunde.

Alian tre gravan renkontiĝon mi povis konstati kaj travivi: en multaj Ne Registraraj Organizoj (NROj) oni povis observi kunlaboron inter la lokaj aktivistoj kaj la vizitantoj el la Nordo, plej ofte Blankuloj. Same okazis en la Esperanto-stando. Mi decidis flugi al Dakaro, Senegalio, por tiu Forumo. Mi kolektis informilojn en la franca, angla kaj hispana. Mi ricevis multajn, mi mem printis kaj multobligis dokumentojn, kiujn mi obtenis per la reto. Entute estis

proks. 14 kg da informiloj en miaj valizoj. Mi dankas al Meksiko, Germanio, UFE, SATamikaro, Britio kaj privatuloj, kiuj fordonis duonon de sia propra stoko.

Mi aligis UEA-n per la reto mendante standon. Tamen ni ne ricevis ĝin. Sed Senegala Esperanto Asocio (SEA) ricevis standon, sen havi informilojn. Do tute pragmatisme ni kunvenis en la surfaco de SEA.

Ni deĵoris preskaŭ ĉiam kvinope: kunlaboris Alphonse Diatta, Assane Faye, Antoine Gomis kaj Fidel Bassene. Tiuj kvar senegalaj samideanoj bonege klarigis al la publiko pri nia lingvo, nia kulturo, nia movado. La stando estis granda sukceso. Supozebe SEA kreskos en la venontaj

monatoj.

En la publiko estis ĉefe afrikanoj. Tamen skipo da gimnazianoj el Valenco, Francio, partoprenis la tutan Forumon kaj ofte vizitis nin en gaja etoso. Foto montras intervjuon faritan de ili. Journalisto de «The Guardian» observis la multlingvecon de tiu Forumo kaj menciis mian T-ĉemizon kun mencio de Esperanto.

Mireille Grosjean
<http://mirejo3.blogspot.com/2011/02/dakar.html>

Vidu alian artikolon p.14-15



Mapo en Esperanto

De kelkaj jaroj ni publikigas, dufoje jare, artikolon de Andreo Andrio pri esperantigo de propraj nomoj. Por konkretigi tion, ni preparas mapon de la franclingvaj landoj de Eŭropo, kun esperantigo de la ĉefaj administraj nomoj: regionoj, departementoj (aŭ provincoj kaj kantonoj ekster Francio) kaj iliaj ĉefurboj. Tiu mapo povos esti uzata kiel afiŝo, fiksebla ĉe muro, kaj kiel skrib- aŭ teler-subaĵo.

Kelkaj el la nomoj de tiu mapo estas jam familiaraj, kaj troveblaj en PIV; aliaj estas proponoj, kiuj povos esti modifataj se montriĝos pli bonaj esperantigoj. Apud la mapo mem estos listoj ambaŭlingvaj, kiuj helpas iri de unu lingvo al alia, okaze de dubo.

Danke al tiu mapo, la ĉefaj nomoj, esperantigitaj, estos same prononceblaj de ĉiuj esperantistoj, sendepende de ilia scipovo de la franca lingvo. La nefranclingvaj esperantistoj ne plu riskos stumbli kontraŭ la 15 vokalaj fonemoj de la franca lingvo, kaj diversaj aliaj fonetikaj malfacilaĵoj.

Tiuj novaj mapoj estos aĉeteblaj ĉe la libroservo, okaze de la venonta kongreso en Seto.

(La ĉi-apuda bildo montras ĝin en ĝia nuna stato, ne tute finpreta. Ekde nun –sed rapide!– Reagu se vi havas proponojn aŭ kritikojn por fari !)



Titolo de la mapo

Loko por SAT-Amikara emblemo

E-kuku! Bordozaj kuketoj

Preparu la paston la antaŭan tagon.

- 1/2 litro da kompleta lakto
- 2 ovoj kaj 1 flavajo
- 225 g da sukero
- 125 g da faruno
- 20 g da butero

Miksu la ovojn kaj aldonu la varmigitan lakton. Miksu per kirlilo. Aldonu la sukero kaj la fanditan buteron kaj laste la farunon miksan malrapide.

Aldonu la rumon post malvarmiĝo kaj lasu en fridujo dum minimume unu nokto.

Instalu la molajn muldilojn sur la krandon de la forno kaj poste ĝisrande plenu ilin.

Enfornigu en varman fornon (200°) dum minimume 55 minutoj. La kuketoj devas esti tre brunaj.

Morine



Legindaj Legendoj Bunta¹ fabelo.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el la tuta mondo akompanatajn de lingvaj klarigoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

Ruĝkufulino² iris tra verde malluma arbaro porti poton da butero al sia avino. Ŝi renkontis la nigran lupon. Ĝia avida rigardo mezuris la predon. Bone juna, mola, apetitivoka³, abunda manĝo, kiel de longe ĝi ne konis. «Kien do vi iras», demandis ĝi la knabinon? «Porti iom da butero al Avinjo, kiu da ĝi ne plu havas». Tiam, la tri rozaj porketoj petolante⁴ alvenis sur la

kun kanzoneto ĉe la buŝo kaj suno en la koro. La tri ĝojaj porketoj ronde dancis, du paŝojn dekstren, du paŝojn maldekstren, fleksante la genuojn, en la domoj, kiujn ili konstruis por si, rondaj, samcentraj⁷. Unu el pajlo, la dua el branĉoj, la tria el brikoj. Lupo kurante, uf, uf, alvenis, sentis la bonan odoron de la ĉarmaj bestetoj, kriis: «malfermu la pordon!» kaj minacis: «se ne, mi blovos uf kaj puf, kaj la domo disfalos». Ĝi unue vidis nur la pajlon tra ĝiaj malsataj okuloj. «Ha! Ha», kantis la porketoj. Kolere, Lupo impetis, sturmis la pajlon, disjetis la branĉojn, koliziis kontraŭ la malmola brika muro. Subita halto kaj dolora tubero, kandeloj en la ĉielo.

Dance, kante, Ruĝkufulino alvenis ĉe sia griza avnieto⁷ kun ŝia blanka punta kufo. «Kiel longa estas via bruna dento», demandis la knabino. «Ne moku maljunulinon» estis la rebato. Ĝi sufiĉas por mordi flavetan buteron. Tial, en tiu bunta printempo, ĉiuj senzorge feliĉis. Krom Lupo, kompreneble.



pado kun siaj spiralaj vostetoj. «Mi ne povos manĝi la tuton», Lupo pripensis, kaj ĝi kuris malproksimen por prepari iun embuskon. Ruĝkufulino plu iris kaj preterpasis la kastelon de Blubarbulo. Tiu ĉi tralorne⁵ gvatis la preterpasantojn, esperante kompleti sian kolekton da princinoj. Li taksis la infanon laŭ sia gusto sed tamen, tro juna, tro mola, ne konsumebla. Ruĝkufulino trankvile marŝis plu, ne konsciante⁶ la danĝerojn, kiujn malsato kaj la printempo lokis antaŭ ŝin. Ŝi saltetante paŝis

Notoj:

- 1 multkolora
- 2 ino kun ruĝa kufo (speco de ĉapo)
- 3 kiu vekas apetiton
- 4 en batifolant
- 5 tra iu lorno
- 6 ŝi ne konsciis
- 7 Ili havis la saman centron
- 8 av-nj-eto = kara eta avino

Klod

Plu pri tiu damnita fr-suplemento !

En tiu numero 73 de *La Sago* malaperas (provizore ?) la franclingva suplemento.

Ja en la du antaŭaj SAT-Amikaraj kongresoj, ene de la laborgrupoj pri La Sago, oni tre vigle postulis ke plu daŭru tiu kvarpaĝa suplemento, sed kvankam kelkaj sin proponis por nutri ĝin, ĉefe pri aktualaĵoj, tre magras la ricevitaĵoj - kiuj apenaŭ sufiĉas por plenigi unu kolumnon ĉiunumere. Pri la front-artikoloj de ĉi suplemento, la problemo samas, krom raraj esceptoj (ĉefe de JoLoKo) neniu spontane proponas ion. La plenigado do falas sur la ŝultrojn de la ĉefredaktoro, samtempe asocia sekretario (Vito) kaj de la enpaĝigisto (mi), por kiuj, tiu kroma laboro estas troa.

Ni pensis unue plibeligi la suplementon - interalie, presigi ĝin kolore - por vekti emon al partopreno en ĝin. Sed tutcerte la problemo ne kuŝas tie.

Fakte la celo de tiu suplemento restas tre duba. Oni aludis la uzon propagandcelan, per detranĉo el la revuo por disdonado al neesperantistoj... ŝajnas ke neniu faras tion. En tiu kazo, kial nepre kvar paĝoj? Ĉu utilas rubrikaj kiel «L'espéranto, comment ça marche?»⁽¹⁾

Post diskuto sine de la redakta skipo, ni proponos okaze de la kongreso, novan formulon, kaj tiu numero utilas kiel provekzemplero, kiel bazo por diskuto. Ĉiuj membroj, ekde nun, povas reagi al tiu propono, ĉefe evidente, se ili ne partoprenos en la kongreso.

La formulo proponata prezentiĝas jene:

- La du rubrikaj «Esperantistoj aktivitas» kaj «Dans la presse et ailleurs» kunfandiĝas en unu nura, kies titolo iĝas (provizore, ĝis oni trovas pli trafte) «Le Mouvement en mouvement / Plu moviĝas la Movado». Kaj aperos nur tio, kion oni sendos, kohere laŭ temo, mikse laŭ lingvo (efektive, ĝis nun, tre ofte informoj troviĝis en iu rubriko aŭ alia, kvankam samecaj sed nur ĉar redaktitaj jen en la Franca, jen en Esperanto).

-La Franclingvasuplemento iĝos memstara jara numero - t.e. aparta numero, nur en la franca, kiu estos ece propaganda. Ĝi entenos diversajn artikolojn kiuj ĝis nun aperis frontpaĝe de la Fr:sup, plus klarigoj, ludoj, anekdotoj, ktp, pri la lingvo (kiel ekzemple «L'espéranto, comment ça marche?»)

Tiun numeron la abono inkluzivos kiel memstaran numeron kaj kiu estos eldonota pli grandkvante, cele al disdonado. (Asocioj povos aĉeti ĝin je favora prezo laŭ kvanto)

Koloraj paĝoj ege kostas. Do por la «normalaj» numeroj, la formulo planas uzi nur esceptokaze kolorajn internajn paĝojn, favore al la jara franclingva suplemento, eventuale tutkolora, kiu eble pli allogos se iom luksa...

Reagu, reagu ! Rete aŭ poŝte al La Sago (adreso ĉi sube)

Serĝo
la damnita enpaĝiganto

(1) Tiu rubriko ricevis laŭdojn de legantoj (vidu p.6) sed verŝajne nur pro la hipoteza celo propaganda kiun oni atribuas al la suplemento.

Tiu ĉi numero aperas iom pli malfrue ol la (normala) kutima ritmo - t.e. meze de la monato - ne pro preseja problemo, sed unue, ĉar Februaro pli kurtas ol la aliaj monatoj, kaj plie ĝi estos la lasta antaŭ la kongreso, kiu okazos sufiĉe malfrue ĉi-jare. La venonta (Aprilo-Majo) estas antaŭ-vidita meze de Majo.

Referendumo plu...

Fate-fuŝe, dufoje nia presisto forĝis aldoni kromparton de referendumilo 2010, kromparto resendenda rete al sekretario@sat-amikaro.org aŭ poŝte al la sidejo antaŭ la 15a de aprilo 2011. Antaŭdankon!

A3. Ĉu vi ratifas la kandidatigon (k elektigon) de SAT-Amikaro kiel societano, al la Komitato de la Esperanto-KulturDomo Greziljono, kiun aprobis la 65a kongreso de SAT-Amikaro en Hiliono ?

Informojn pri tio legu ĉe p3 kaj p6 de La Sago 71

Por poŝte respondi, simple uzu la adresfolion de la revuo, kaj mane skribu simple: «Greziljono: jes, ne aŭ detene», kun eventualaj komentoj.

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo. **Enpaĝiganto:** Serĝo Sir'. **Redakt-kaj korekt-skipo:** Andreo Andrio, Jak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', kun helpo de: Francau' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos, Lino Markovo.

Partoprenis en ĉi numero: Andreo Andrio, Daniel Biro, Guy Camy, Guy Cavalier, Louis Gohin, Mireille Grosjean, JeanSeB, Klod, JoloKo, Bernard Lagrange, Jak Le Puil, Vito Markovo, Guy Martin, Jocelyne Monneret, Lin' Morel', Morine, Christian Mouré, Jean-Paul Moyon, Jean Selle, Serĝo Sir', Philippe Stride, Juliette Ternant.

Kontribuajoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

Serge Sire (Serĝo Sir')
85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto : lasago@free.fr

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por litigitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ de préférence par internet, **textes** en format RTF ou TXT pour un document joint, et **images** en format TIFF, JPEG ou GIF.

■ éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.

■ Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Reproso de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Enhavo

- 1 [Kovrilpaĝo](#) Monda Sociala Forumo
- 2 [Mapo en Esperanto](#) [Legendaj legendoj](#) [E-kuku!](#)
- 3 [Tiu damnita Fr-sup!](#)
- 4 [Agad-Raporto](#)
- 5 [Kribrado de la referendumiloj](#)
- 6 [Kongreso de Seto](#) debatoj kaj diversajoj
- 7-8 [Kiel traduki Pièce](#)
- 8 [Libro-servo](#)
- 9 [Libroj vivas pli longe](#)
- 10 [Emblemoj](#) [Kontribuo al Vikipedio](#)
- 11 [Maniero prirabi la trian mondon](#) [HuMorelaj Linioj...](#) kaj respondo
- 12 [Ekozofia Angulo](#)
[Plu moviĝas la Movado](#)
- 13 [Interwiev D. Moirand](#)
- 14 [Dakar: Le Forum bat son plein](#)
- 15 [Béarn, Bretonio, Châlon](#)
- 16 [Quetigny-Staĝo](#)
- 16 [Ĉe la lago 73](#)

Agadraporto

Kasule

La transdono de la kasista laboro estis sufiĉe grava evento, se konsideri ke la antaŭa kasistoŝanĝo datiĝis de antaŭ 35 jaroj. Feliĉe la transigo okazis plej glate pro tio, ke ambaŭ malnova k nova kasisto multege k bonege interrilatis por ke la modernigo (ja temis ankaŭ transiri de papera mastrumado al komputila) okazis en plej bonaj kondiĉoj. Ne malpli grava adaptiĝo ligite al tio estis la transiro al membraro-slipoj entute bitmastrumita. K estas verŝajne, ke la grandega laboro entute enkomputiligi la informojn pri la membroj okazis kun eraretoj k diversaj fuŝetoj, sed nun la afero estas finita k preskaŭ ĉiuj informoj estis transigitaj al komputila formo, kiom eble.

Iniciatita estis minimuma nenula kotizo, kiu ebligas al ĉiuj homoj, kiuj tion deziras membriĝi sendepende de financa situacio.

Membrare k perante

Konsekvenco de la «emeritiĝo» de la antaŭa kasisto estas, ke la giganta laboro kiun li faris ĉiujare por unuope telefone rememorigi al malfruantaj membroj rekotizi ne estis same farita en 2010. Sed feliĉe ekfunkciis la peranto-reto k la klopodoj de unuopaj (foje helpitaj) lokaj perantoj multe helpis limigi la perdon de «forgesemaj» membroj. Tamen ne ĉiuj estis persone telefone realvokitaj (kvankam ekfunkciis ekde julio la komunikoj per la sendfolio) Plie, pro nia purigado de la membraro-listo, ni perdis multajn membrojn, kiuj ne plu kotizis de pluraj jaroj. En 2010, 482 membroj aliĝis al SAT-amikaro, kompare al la 628 deklaritaj en 2009, t.e. minus 146 membroj.

De kelkaj monatoj la komitato prenis

Selle humuraĵo Ne kompreno en Afganio



kontaktojn kun eksterfranciaj (k ekstereŭropaj, ĉefe afrikaj) esperantistoj kun la celo disvastigi la konkretan agadoblecojn de SAT-Amikaro en franclingvio. Kiuj povas helpi pri tio, anonciĝu, helpo bonvenas!

Komitato

Kunvenis 18 fojojn dum la jaro. Ekde la eniro de Gi' (Guy Martin), provincono el fora Bretonio, la Parizanoj devis lerni labori pli k pli rete, sed tio bone funkcias ĝis nun (Gi' sufiĉe ofte partoprenas fizike, aŭ se ne skajpe aŭ simple telefone). Interalie la reta (en sekura nepublika spaco) arhivigo de la informoj helpas al ĉiuj komitatanoj havi ĉiaman aliron al ili, eĉ ekstersideje.

La fakto ke la lokaj perantoj ricevas la komitatajn protokolojn k laŭokaze reagis al ĝi ebligas tiel funkciigi ian ĝeneralan konsilantaron tre utilan. Pro malsano, Dominiko rezignis pri sia posteno kaj Gi Kavaliere (Cavalier) iĝis prezidanto de SAT-amikaro post la kongreso 2010.

Revuo

Bedaŭrinde pri La Sago nenio vere nova kompare kun pasintjare (vidu do la antaŭan raporton, k legu la artikolon ĉe p.3)

Perkoresponde

Zorgis Klod' pri la perkorespondaj kursoj, kiu anoncis sian deziron lasi la postenon. Vd LS72.

Reteje

Plu manko da kunlaboremuloj (unu homo ne povas mastrumi ĝin efike, krom farante nur tion, kio ne estas la celo). Nun praktike kvazaŭ nur unu homo zorgas pri ties vivigo, k tio koste de sekretaria laboro!

Vera neceso estas organizi staĝetojn pri instruado kiel funkcias SPIP (povus estis samtempe kiel staĝoj pri Vikipediumado). Interesatoj pri tio kontaktu la sekretariejon.

Ek de junio aperis monata reta informletero (en la franca, celanta ankaŭ neesperantistan publikon), kiu ebligas konigi al la ricevantojn resumon pri la vivo de la asocio k ties revuoj k retejo. Al ĝi estas invititaj ĉiuj partopreni, sendante informojn k reagojn, kion jam pluraj faras (dankon!). Nova retejo estis preparita de Francua', kiu staĝis dum tri monatoj, sed restas finota.

Greziljone

Enkomitataniĝo de SAT-Amikaro ek de junio. Vd en LS71. (Tuteme vidu p.3 «referendumo plu...»)

EORadie

La elsendoj pluis tiujare kiel en 2009.

EO-Filme

Finfarata por esti projekciebla en Seto... La reĝisoro Dominiko Gaŭtiero filmis dum tuta 2010 en diversaj renkontiĝoj k famejoj de E-io: ĉeesto en kongresoj de SAT k SAT-Amikaro, en UK, Festo, IJK, Bjalistoko, Greziljono...

Petskribe

Kiel vi vidis en LS72 (franclingve), la laboro pri naciskala petskribo por Eo ĉe la bakalaŭreco bone antaŭeniris postkiam ambaŭ komitatoj de UFE k SAT-Amikaro estis voĉdonintaj la buĝeton. Oficiala ekigo en Seto kun publikigo de la listo de unuaj (konataj) subskribintoj k dispartigo de la kampanj-materialo al la lokaj grupoj.

Kongrese

2010 sukcesa tre, interalie bonega rilatado al la gazetaro. Planite post Seto 2011 estas Greziljono 2012 k Metabjefo (Métabief) 2013.

Sideje

Dejorado tro okaza. Prikonsiderindas dungado per helpita kontrakto de iu por pli sisteme deĵori k zorgi aliajn asociajn taskojn. Debatota temo dumkongrese (en la parto pri perspektivoj post kelkaj jaroj).

Por la komitato, la sekretario, Markovo-Vito

Helpo al foraj landoj

Ĉi-jare sendinte al diversaj 9 adresoj en Afriko + 1 en Haitio, mi plezurigis ĉiujn petojn, kiuj trafis min.

Lastan jaron mi enpoŝtigis la pakojn en poŝtofercejo de najbara urbeto. Tie oni akceptas sendi ilin laŭ tarifo «libroj kaj broŝuroj». El tiu oficejo la pakoj trafas la adresitojn post kelkaj semajnoj – 3 ĝis 7. Antaŭe ĉiam necesis atendi minimume 2,5 monatojn – eĉ unufoje ... 11 monatojn.

La ĉi-jara bilanco resumiĝas per tiuj du nombroj: 48,34 kg – 122,86 €.

Kiel mi jam anoncis, ekde nun mi klopodos elĉerpi la stokon da materialo kuŝantan ĉe mia dispono por Afrikanoj kaj aliaj bezonantoj. Post la elĉerpiĝo mi rezignos pri persona respondeco rilate al helpado de Afrikanoj nome de SAT-Amikaro.

Jean-Yves Santerre

Kribrado de la referendumiloj

Referendumiloj ricevitaj = 86; sennoma = 1; validaj = 85

Rubriko A1 - aprobo por la listo de komitatanoj: respondoj = 79, nevalida = 1, jes = 71, ne = 1, sindetenoj = 6, sen indikoj = 7.

Eventualaj komentoj: unu jesas sed bedaŭras ne koni ĉiujn komitatanojn; tri sindetenas preferante nome voĉdoni; Inter ili iu dezirus modifi la internan regulon de la asocio; La nevalida respondo temis pri forstreko de nomo en la listo mem.

Rubriko A2 - Asocia emblemo. 10 proponoj antaŭelektitaj de la komitatanoj kaj prezentitaj al ĉiuj en La Sago n°69. Respondoj = 62. Jen la rezultoj:

Pozicio	Emblemo	poentoj
1	1	71
2	2	44
3	10	33
4	4 & 8	30
6	5	24
7	3 & 9	23
9	7	19
10	6	16



Rimarkoj: 4anoj rimarkigas la mallegeblecon de kelkaj motoj kaj deziras devigan aldonon de la vortoj Esperanto kaj Sat-Amikaro.

Rubriko B - Partopreno al la kongreso. Respondoj = 79, jes = 35, ne certe = 21, certe ne = 23.

Tio estas ĉiam miriga tiuj kiuj povas antaŭanonci sian disponeblecon kaj tiom utila por la kongresorganizantoj.

Rubriko C - Priasociaj rimarkoj. Nur 5 anoj respondis, ĉu per ne, ĉu per detalita esprimo; lu skribas ke li havas «tro da» rimarkoj por fari (ni ne scias ĉu temas pri plendoj aŭ gratuloj), alia plendas ke li ne ricevis atestilon pri sendado de materialo kaj la lasta gratulas nin pri la decido de komuna renkontiĝo.

Ŝajnas ke la plenskribita dorso de la referendumilo ne ebligis facilan esprimon de nia membraro.

Rubriko Ĉ - Aktivado kaj kontribuajoj al la asocio.

-1. Informado. Respondis = 10, reago kaj rebato pri Esperanto = 7, kolekto de artikoloj = 9

-2. Komputila prilaborado de tekstoj. Respondis = 8, inter ili jen la dispartigo de la eblecoj.

Prilaborado de tekstoj en Esperanto = 4, en la franca = 6, en alia lingvo = 1 (angla), tajpado de manskribitaj tekstoj = 6, skanado = 2, optika teksta rekono = 1.

-3. Perreta laboro. Respondis = 6, fakte

malmulte da anoj pri tiu grava kaj aktuala temo pli kaj pli iĝas esenca. Jen la detaloj: perkorespondaj kursoj per skype (skajpo) korektado de taskoj, ĝisdatigo de la asocia retejo kaj interreta informprovizado.

-4. Kontrolo aŭ tradukado de manuskripto. Respondis = 8, iliaj kompetentecoj koncernas altradukon, detradukon pri Esperanto kaj la franca sed por unu aldoniĝas la angla.

-5. Revuo La Sago. Respondis = 11, sendado de artikoloj Esperantaj = 11, francaj = 3, recenzo = 0, desegnoj = 2.

-6. Organizado de Esperantaj aranĝoj. Respondis = 6. Krom kongresorganizado, la prelegvojaĝoj kaj turisma vizitado estas menciitaj kadre de aliaj aranĝoj.

-7. Partopreno en manifestacioj kun socia karaktero. Respondis = 14; Du anoj citas la 1an de majo.

-8. Loka peranto/kontakto de Sat-Amikaro. Respondis = 27; Jesas estiĝi = 8, ne = 18; Nur 3 deziras ricevi ties informojn kaj 9 ne.

-9. Sidejo de Sat-Amikaro. Respondis = 6 (kiuj jam multe tie aktivis).

-10. Partopreno aŭ starigo de loka grupo. Respondis = 26. Jes = 7, ne = 15; Deziras havi lokajn kontaktojn = 4; Ne = 11.

-11. Sat-Amikaro en afrikaj landoj. Pierre Grollemund sine de la Esperanto-grupo de St-Etienne daŭre agas kaj ĉiujare raportas pri la regulaj kontaktoj kiujn li havas kun du lokaj kluboj en Goma (Zairio)

Rubriko D- Ebleco organizi kongreson. Respondoj = 46, nur Mireille Grosjean sinproponas por organizado en 2013. La aliaj mencias ke ili jam organizis aŭ organizos (St Étienne kaj Sète) aŭ tutsimple diras Ne. Same por eventuale ricevi informojn pri kongresorganizado, el 32 nur 1 jesas.

Rubriko E - Ĉu La Sago respondas al via atendo? Respondoj = 58, jes = 53, ne = 5.

Tri anoj faras proponojn kaj rimarkojn: Al la revuo mankas la kleraj artikoloj de Henriko Masson; aperigo de «amuzaj rakontoj» (ne konkurencaj al Selle humuraĵo); klara difino de la trafendaj celoj de nia gazeto kaj ĝia rolo apud la retejo.

Rubriko F - Prezento de Esperanto en publikaj lokoj. Respondoj = 53, jes = 28, ne = 25.

Disdonado de La Sago en publikaj lokoj. Respondoj = 43, jes = 11, ne = 32.

Malmultaj komentas sed deziras ricevi plurajn ekzemplerojn okaze de ciklaj aranĝoj; lu klarigas pri la nuna eksteriĝo de la sindikatoj fare de la publiko kaj proponas ke la asocio faru same; Male,

alia ano per loka grupo kunlaboras kun diversaj asocioj.

Jen listo de tiuj nomataj «publikaj lokoj»: libro-foiro, échanges de savoirs, informrenkontiĝo, fête de l'amitié, AFCE esperanto seminario, mediateko, biblioteko, malfermitaj pordoj en IUT, fête de l'humanité, disdonado en vendejoj, en kolegio, festo de la asocioj, maison alternative et solidaire, asocia forumo, FJT, éclaireurs de france

Rubriko G - Ĉu vi instruas Esperanton, se jes, perkiumetodo? Respondis = 27, parolaj kursoj = 20, perkorespondaj kursoj = 5, dum staĝoj = 3; Per persona kaj membakita metodo = 9, per «cours rationnel» = 8, per «junulkurso» = 5,, per «paŝo al plena posedo», «Bek metodo», «Esperanto par la méthode directe» = 2, per «fervojistaj metodo», «por la praktikantoj», «Ribot metodo», «Saluton», «Cseh metodo» = 1.

Rubriko Ĝ - Ĉu vi konsentas ke ni transdonu viajn personajn kontaktojn? Respondis = 67, jes = 46, ne = 14. Inter la aprobantoj, 6 ne deziras komuniki ĉiujn eblecojn.

Ĉu prefere al Sat-Amikaranoj? Respondis = 62, jes = 55, ne = 7.

Fakte 43 jesis al la du demandoj de tiu rubriko kaj 14 deziras transdoni siajn kontaktojn nur al Sat-Amikaranoj.

Rubriko H kaj Ĥ - Adresoj de simpatiantoj aŭ de izolitaj esperantistoj. Ni sendos al ili la necesajn informojn, dankon al la 2 amikoj kiuj provizis tiun rubrikon.

Rubriko I - Ne membro de Sat, ĉu vi deziras ricevi informojn pri ĝi? Respondis = 19, jes = 6, ne = 12.

Aliĝi al Sat? Respondis = 11, jes = 0, ne = 11.

Nur 2 sin deklaras Sat-membro.

Certe vi havos malfacilaĵojn por rekalkuli per tiuj ciferoj sed prikalkulu ke kelkaj «respondis» per pluraj respondoj; Ni ĉiuj konscias ke la elekto de «jes aŭ ne» krudas sed ni havis la eblecon lasi klarigojn dorse de la referendumiloj. Estis pravigitaj plendoj pro tiu jam parte presita flanko!

Menciinda estas la fakto ke tiuj kiuj plenumis la referendumilon estas jam ege aktivaj.

Dankon al tiuj kiuj fidis la porjaran asocian komitatono.

Guy Cavalier

Kasraporto

En tiu dato, tro frua por la kaso, la raporto ne eblas. Ĝi estos prezentita okaze de la kongreso kaj publikita en La Sago 74.

Kongreso en Seto Laborgrupoj - Debatoj

Pri perantoj kaj lokaj grupoj

Por nia venonta kongreso en Seto, la komitato proponas organizi laborgrupon pri perantoj kaj lokaj grupoj. Nun SAT-Amikaro havas perantojn el Belgio, Burgonjo, Bretonio, Centro, Francilio, Limoĝio, Loreno, Sudo-Pireneoj, Nordo-Kalezio, Luarlandoj kaj Svisio. Ni ankaŭ havas plurajn lokajn grupojn: Pariza grupo, 65 (Altaj-Pireneoj), Espéranto Gironde, La verda stelo (Val-de-Marne), Brusela grupo, Espéranto en Vendômois (Loir-et-Cher), Cercle amical espérantiste Beauville (Lot-et-Garonne).

La celo de tiu laborgrupo estas: interŝanĝi pri la rolo de la perantoj, diskuti pri la rolo kaj la rimedoj de lokaj grupoj, trovi novajn perantojn en aliaj regionoj, fondi novajn lokajn grupojn, kunordigi la agadojn de la perantoj kun la komitato.

Gvidos ĉi laborgrupon: Maksil'.

Instruado kaj ekzamenoj

Nia statuto donas al si kiel unuan celon:

a) de propager et d'enseigner la langue universelle ESPERANTO dans les milieux d'avant-garde....

Organizado de E-instruado do estas ĉefa zorgo de la asocio. Kolekti informojn pri ĉiuj ekzistantaj kursoj en Francflingvio estas unua paŝo, ne sufiĉa. Necesas zorgi pri interrilatigo de instruantoj, aperigo de kvalita lern- k instru-materialo, formado de kvalitatig instruantoj, ktp. Ekzamenoj k la laboro ene de FEI celas kunordigi tion kun UFE k ĉiuj neŭtralaj grupoj. Jen kampo, kie interesacia kunlaboro estas tute ebla k tre dezirinda.

Gvidos ĉi laborgrupon: Vito

Loka agado en rilato kun neesperantistoj samcelaj

Multaj inter ni disvastigas la lingvon en diversaj medioj: lernejo, hejmo de junaj laboristoj, domo de la junuloj kaj de la kulturo, forumo, salono, ktp,

Ĉiu serĉas kiel renkonti homojn kiuj interesiĝas en egaleca komunikado.

Ni proponos en tiu laborgrupo pripensi niajn diversajn spertojn, la fiaskojn kaj la sukcesojn. Ni devos esplori la kialojn de la fiasko kaj de la sukceso kaj tiel ni pliriĉiĝos unuj la aliajn.

Ni esploros la mediojn kiuj

prezentas la valorojn de Esperanto: solidareco, paco, humaneco, ktp... kaj kiuj bezonas ties avantaĝojn: komunikado, kultura interŝanĝo, ktp...

Kelkaj inter ni povos klarigi kiel la internaciaj solidarecaj asocioj taksas la uzadon de esperanto aŭ kial la Ne-Registaraj Organizaĵoj (ONG) ne uzas kutime esperanton?

Ni ankaŭ povos interŝanĝi pri la diversaj manieroj prezenti la gravecon de esperanto. Kelkaj prezentadoj estas pli sukcesplenaj ol aliaj, kial laŭ la medioj, la publiko estas pli aŭ malpli ricevema.

Mi kore invitas vin partopreni en tiu debato.

Gvidos ĉi laborgrupon: Philippe Stride.

Ĉefaj agadoj de nia komitato/ asocio dum la kvin venontaj jaroj

Plenkunsido lundon la 25an de aprilo 2011 9a-11a

Ĉar la komitatanoj estas elektitaj de la membroj de SAT-amikaro kaj reprezentas ilin dum sia mandatperiodo, la komitato proponas debaton pri la ĉefaj agadoj, kiujn ĝi plenumos dum la 5 venontaj jaroj. La komitato jam iomete cerbumis por lanĉi unuajn temojn kaj esperas ricevi novajn gravajn sugestojn.

■ Adapti nian asocion al novaj komunikiloj por varbi en aliaj medioj.

■ Krei retan libroservon por plidiskoniĝi nian librotrezoron.

■ Dungu iun por helpi la bonvolemlulojn kaj pliofte malfermi nian sidejon.

■ Disvolvigi nian asocion alikontinente en francflingvolandoj.

■ Trovi novajn lokojn por stoki la librojn, kiuj ĝis nun kuŝas en garaĝo apud Parizo.

■ Helpi lokajn grupojn per informiloj por agadi kaj varbi al Esperanto kaj al SAT.

■ Sonregistri La Sago-n por ebligi legadon far blinduloj kaj malbonvidantoj, interalie maljunaj membroj.

Gvidos ĉi debaton: Guy Martin.



Por komenci vian venontan kongreson en Seto, ni invitas vin partopreni en debato gvidota de Guy Martin:

«Per Esperanto por helpo al migruloj en Francio»

Sabaton la 23-an de aprilo je la 9a-11a en salono Léo Lentaigne

Esperanto, solidareca lingvo? Kiel ni povus uzi ĝin por helpi rifuĝintojn en iliaj petoj pri oficialaj dokumentoj, renkontoj kun aliaj migruloj? Ĉu Esperanto povas helpi ilin en lernado de lingvo en la lando, kie ili nun vivas?

Post mallonga historio pri migrado, ni debatos pri tiuj demandoj. Sendube pluraj partoprenantoj atestos pri siaj agadoj en tiu kampo.

bankedo de la senkreduloj

Paralele al la kongreso en Seto, la nun tradicia bankedo de la senkreduloj okazos

vendredon 22an de Aprilo,

Hotel-Restaurant LE VENISE
64 A Corniche Neubourg
34200 SETE
Tel: 04-67-53-02-86

Rezervu poŝte aŭ telefone, rekte ĉe la restoraciestro.

Selle humuraĵo Ministra vizito

Sinjoro la ministro, mia bovino Margareto estas tre kontenta pro via aŭtografon sur unu el siaj produktaĵoj.

Mi estas tie por tio!



La Sago 73. Marto 2011 p6

SAT-Amikaro

Sideja dejorhoraro. Permanence au siège

Lundi 17h30 – 19h30
Mardi 10h00 – 16h00 (non régulière)
Mercredi 14h30 – 18h00
Jeudi 15h00 – 18h30
Vendredi 09h30 – 17h 00 puis 17h30–19h30
Samedi 11h00 – 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

Les lundis 17H30 avec Georges Meilhac
Les mercredis 14H30 avec Hélène Bonjour.

Les samedis 14H00 avec Vincent Charlot

Perkorespondaj kursoj. Cours par correspondance.

Serge Sire
85 imp. des Féés 74330 Sillingy
Ret: lasago@free.fr

(kiu dispartigas al la diversaj korektantoj laŭ niveloj Qui répartis aux différents correcteurs selon niveaux)

50 €.
25 € (senlaboruloj, junuloj -malpli ol 25j. Chômeur, jeune moins de 25 ans)

Ĉeko profite al SAT-Amikaro. Chèque à l'ordre de SAT-Amikaro

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Paiements et renseignements sur l'espéranto

■ Belgio Belgique:
Claude Glady: Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).
Bankkonto N° 750-6373051-18
IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ Svisio Suisse
Mireille Grosjean: Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets
Poŝta konto n° 23-14908-9.

SAT

Kio estas SAT?

Sennacieca Asocio Tutmonda: naskiĝis en 1921, estas asocio tutmonda de laboristoj, kaj pli ĝenerale de progresemluloj, kies agado centriĝas sur kulturo kaj popola edukado. Ĝi utiligas Esperanton kiel laborlingvon.

www.satesperanto.org

Aliĝo kun abono al «Sennaciulo» 52 € (Nura abono: 57€)

■ En Francio: Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ En Belgio: Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

La Sago 73. Marto 2011 p7

Aliaj landoj autres pays

Pagoj paiements

Guy Martin: 3 rue Voltaire
22000 Saint-Brieuc;
Reto: kasisto@sat-amikaro.org
tel: 0033 (0)953 927 737
fakso: 0033 (0)222 441 319

Renseignements:

SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris
Tel.: 01 44 24 50 48

Pago per ĝiro:

SAT-AMIKARO. CCP: 37 852 90 L La Source.
IBAN, FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314; BIC: PSST FRPPSC

Retejo

www.sat-amikaro.org

Tarifoj 2011 Tarifs 2011	Be, Ch, Fr	Aliaj landoj
Kotizo (kun abono 60%) Cotisation (avec abonnement)	35 €	42 €
Kotizo sen abono Cotisation sans abonnement	14 €	14 €
Subtenkotizo (abono 30%) Cotis. soutien (abon. 30%)	70 €	84 €
junulo (malpli ol 25j.), senlaborulo, kunul(in)o jeune (moins de 25 ans), chômeur, conjoint(e)	17,50 €	21 €
Minimuma kotizo Cotisation minimale	libera libre	libera libre
Simpla abono Abonnement simple	32 €	39 €

Kiel traduki Pièce

La vorto **pièce**, kiu devenas de gaŭla vorto signifanta terpecon, alprenis en la franca lingvo tre diversajn signifojn, proprajn kaj figurajn. Ĝi ofte tradukiĝas per **peco**, kiu ankaŭ ricevas figurajn sencojn, sed en multaj okazoj alia traduko estas pli internacie komprenebla.

■ Ni konsideru unue la okazojn, kie tiu vorto indikas parton de io pli granda.

Découper une pièce dans du cuir. Detranĉi pecon el led.

Un emporte-pièce sert à découper Štancilo (aŭ premtranĉilo) uziĝas d'un seul coup des pièces de forme por eltranĉi figurojn per premo déterminée. aŭ frapo.

Il porte des jugements à l'emporte-pièce. Li faras tranĉajn juĝojn.

Il s'est tellement mis en colère qu'il a mis en pièces son verre. Li tiel koleris, ke li dispecigis sian glason.

Il a taillé les ennemis en pièces. Li disvenkis la malamikojn.

Des fruits vendus au poids ou à la pièce. Fruktoj vendataj laŭpezo aŭ popece.

Cela coûte dix euros la pièce. Tio kostas po dek eŭroj por peco.

On a le temps, on n'est pas aux pièces. Ni havas sufiĉe da tempo, ni ne popece laboras.

Les pièces d'une collection. La pecoj de kolekto.


Un costume trois pièces: veston, Tripeca kompleto de vesto: jak, pantalon et gilet. pantalon kaj veŝto.

Un maillot de bain deux pièces. Dupeca bankostumo.

Cet éleveur a cent pièces de bétail. Tiu bredisto posedas cent brutojn.

Les pièces d'un jeu d'échec. La pecoj de ŝakludo.

En héraldique, les pièces sont des figures géométriques. En heraldiko, la pecoj estas geometriaj figuroj.



En fakaj ŝakludaj tekstoj, oni nomas pecojn ĉiujn pecojn krom la peono.

En heraldiko, la unuarangajn figurojn oni nomas «honoraj pecoj»

A
B
C
D
E
F
G
H
I
J
K
L
M
N
O
P
Q
R
S
T
U
V
W
X
Y
Z




LibroServo

Sat-Amikaro libroservo
132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
Sabate 11H-18H)
Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
Al ĉiu mendo
aldonu:
40% ĝis 5€
35% ĝis 10€
25% ĝis 20€
20% ekde 20€



Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Prelegoj kaj aliaj artikoloj

Roland Levreaud

SAT-Broŭservo/Laŭte!, 1997, 78 paĝoj, A4-formato,
prezo: 6,20 € en la plej dinamika libroservo!

Vi legos (aŭ is) en ĉi tiu numero pri la fino de la liberesprimilo zorgita de Christian Baudé, Laŭte! Sed Baudé ne nur eldonis ĉi gazeton; dekojn da broŝuroj li eldonis, i.a. Kie brulas, ĝentlemanoj?, de Ch. Bukowski, La Kvina Evangelio, de Han Riner, Kontraŭflue, de Valo, Leteroj de E. Lanti, Ne tiel, sed tiel ĉi!, de Faulhaber, La rajto de Pigo, de Paŭlo Lafargue, Poemoj de Omar Kajam, en traduko de Waringhien, ktp.

Mi do volas ĉi tie omaĝi kaj nian amikon Baudé (Kribo por multaj) kaj mian profesoron por preparo al la Kapableco, Roland Levreaud. Cetere en nia (kun Armela LeQuint)

traduko de Céline «Vojaĝo ĝis noktofino» oni povas legi «Omaĝe al Roland Levreaud»; ja por tiu preparo al la Kapableco, Roland Levreaud petis nin traduki paĝon de Céline!

Sep prelegojn enhavas tiu ĉi broŝuro: La socia enhavo de l' jazmuziko, Romain Rolland kaj Paco, Vivo kaj Morto de la Kataristoj, Atomcentraloj: ĉu savaj? ĉu apokalipsaj?, Julio Valles kaj la Pariza Komunumo, Aŭtodidaktoj de Gorkij al lanti kaj Kion gajnis la virinoj el la Franca Revolucio?

Kaj nun iom da jazo!

Ĵak Le Puil

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebila	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Novaja

Nova vivo, La. Ivan G. Ŝirjaev. Prozo originala / romanoj. Pro Esperanto. Vieno. 1993. 78 paĝoj. Prezo: 7.50 € Romano el la 20-aj jaroj, pri la antaŭrevolucia Rusio.

Ĉu Esperanta Dostojevskij?


Originalaj rakontokolekto kaj romano, respektive. Pri la aŭtoro, la ruso Ivan G. Ŝirjaev (1877-1933), scioj pokas. La editoro, H. Mayer, prefaco faras biografiajn peniktaĵojn: Ŝirjaev lernis Esperanton en 1895, instruistis, pastris ekde 1904, iniciatis la Enciklopedion kaj ellaboris gemojn – dise-mise aperintajn – de nia novel-arto.

Mayer plendas kontraŭ la ĝenerala forgeso pri la rusa E-pioniro. Prave. Projekto eldoni ties kompletan verkaron. Aplaudinde. Kaj kolumbe elfavoras: "En niaj vicoj estis Esperanta Dostojevskij. Sed ni ne scias tion." Supertakse.

La Ŝirjaevaj personoj en la novelaro havas ja korpon kaj animon, konstituas psikologie interesajn tipojn, sed ne universalvalorajn arketipojn. Por memrealiĝi kiel tiaj, mankas al ili la spaco de romano kaj troas ĉirkaŭ ili sentimentalito. Tamen, lokite sur romana dimensio, ili transiĝas al simplaj marionetoj metitaj je la servo de intrigo pasintjarcenteska kaj mielo-drama, kvankam ĉiam atento-kapta.

Ŝirjaev dominas la regionon mezan inter longa novelo kaj kurta romano. Kaj ĝuste tie li pleje trafas. Pejzaĝas arkadiojn kaj mornejojn. Beltakte fantazias kaj realumas. Teneras kaj ironias. Kaj uzas skurĝon subtile sed senkompate. Kontraŭ perfido kaj ciniko – multkaratas la epistolstila Stranga knabinaĉo, miaopinio, la plej altkvalita rakonto en la kolekto. Kontraŭ kruelo kaj malkaritato – Venĝo – sine de la klerikaro! Altluge.

En *La nova vivo*, male, Ŝirjaev perdas la takton situacion, rolulan kaj



rakontan, kvankam ne sian priskriban scipovon nek sian kapablon tenadi la intereson de la leganto. Nenie en ĝi percepteblas la pretendita reflekto de la Rusujo antaŭrevolucia. La roluloj askete bonas aŭ pliboniĝas. Neniām ili konscias pri – des malpli ribelas kontraŭ – sia sociale maljusta situacio. Eĉ pli, la feliĉan finon ebligas ĝuste anĝele bonkoraj riĉuloj. Tian finon aŭ pluvon rozpetalan – laŭan al felietona elnodiĝo – antaŭas fabeleska peripetio (verŝajne konceptita kiel provo savi la romanon) tute ne kongrua kun la supozita realismo de la verko. Pleja surprizo ĉe Ŝirjaev: lia stilo. Lia lingvaĵo lirla kaj sentubera kaj natura – artisma –, diferenca disde la koda skemeco ĉe liaj samtempuloj. Lia talento por beletri per la magra vortprovizo de la fru-epoka Esperanto.

Pro ĉiuj bonoj ĝis nun komentitaj – ne pro lia eventuala dostojevskijeco – la verkaro de Ŝirjaev meritas diskonigon. Bonvenos la apero de pliaj liaj elplumaĵoj. Dume mi atendas kaj esperas kaj tiel plu.

Miguel Fernández (Hispanio)
el <http://esperanto.net/literaturo/uea/sirjaevrec.html>

■ En dua grupo da frazoj, la vorto indikas pli sendependan objekton; la limoj inter tiuj du grupoj estas iel arbitraj.

Cette pièce de terre est déjà labourée.	Tiu terpeco estas jam plugita.
Il a dans sa cave dix pièces de vin.	Li havas en sia kelo dek barelojn da vino.
Il y a dans mon parc trois pièces d'eau.	En mia parko estas tri basenoj.
Le marchand de tissus a acheté une pièce de soie.	La teksajisto aĉetis rulon da silko.
Au repas de nocés, il y avait une pièce montée.	En la nupta manĝo estis turkuko.
Un deux pièces cuisine, avec une chambre et un séjour.	Duĉambra apartamento, kun kuirejo, dormoĉambro kaj vivoĉambro.
Une pièce de cinq euros.	Monero je kvin eŭroj.
Donner la pièce à un serveur.	Zoni trinkmonon al kelnero.
Présenter des pièces d'identité.	Prezenti identigilojn.
Apporter des pièces justificatives.	Alporti pruvopecojn.
Le juge observe les pièces à conviction.	La juĝisto observas la konviktajn montraĵojn.
Juger sur pièces, sans se rapporter à autrui.	Juĝi mem laŭ la faktoj, sen dependi de ies opinio.
Envoyer un courriel avec des pièces jointes.	Sendi retmesaĝon kun (al)ligitaj dosieroj.
Il a écrit diverses pièces de vers.	Li skribis diversajn versaĵojn.
Ils ont joué une pièce instrumentale.	Ili ludis instrumentan pecon (aŭ muzikaĵon).
Une pièce de théâtre peut être une comédie, une tragédie, etc.	Teatra peco (aŭ teatraĵo) povas esti komedio, tragedio, ktp.
Faire pièce à quelqu'un.	Rebati iun.
Je lui rendrai la monnaie de sa pièce.	Mi repagos al li pro lia malbonfaro.

■ En tria grupo, ankaŭ iel arbitra, troviĝas ekzemploj, kie la vorto ĝenerale montras iun komponanton.

Les pièces d'une machine.	La pecoj de maŝino.
Des pièces de rechange.	Vicpecoj.
Acheter une machine en pièces détachées.	Aĉeti maŝinon en la stato de komponantoj.
Mettre une pièce à un pantalon.	Alfiki pecon al pantalonon.
L'obelisque est tout d'une pièce.	La obelisko estas el unu sola ŝtono.
Cet homme est tout d'une pièce.	Tiu viro neniam ŝajnigas.
Un raccomodage fait de pièces et de morceaux.	Divers-peca flikaĵo.
Il a inventé cet appareil de toutes pièces.	Li tute inventis tiun aparaton.
Mi konfesas, ke mi ne tute inventis la frazojn de tiu artikolo.	

Andreo Andrio.

La socia enhavo de l' jaz-muziko

(Ĵazo: moderna dancorkestro amerikdevena, karakterizata per aldono de strangaj diverspecaj instrumentoj. Plena Vortaro)*

Por multaj homoj la muziko estas tute aparta, triaranga kulturfako, tiagrade ke, en multaj landoj oni rajtas la titolon klerulo, eĉ se oni restas absolute fremda al tiu arto. Escepte de amasa siropkazona konsumado, temas pri aristokrata tempopasigilo, kiel akvarelo aŭ rajdarto.

Kompense, la muzikamanto ĝenerale ŝatas la t. n. grandajn, seriozajn, klasikajn ĝenrojn, kaj malestimas ĵazon, tute ne komprenante, ke oni ĝuu ilin ambaŭ. Cetere, la publiko sisteme konfuzas ĵazon kun la varieataj pecoj; tiel faras ankaŭ la radiotelevido kaj la diskaj katalogoj.

Eĉ en multaj SAT-anoj persistas tiuj antaŭjuĝoj, esprimitaj per la kutimajgurdataĵojprisimia,sovaĝa, freneza, kanibala kakofonio (Parenteze, oni povus levi la demandon: Kial SAT-anoj, kiuj prave fieras pri sia avangardemo sur la socipolitika, kelkfoje beletra kampo, plejparte malsimpatias al modernaj artformoj?). Mi eble ofendus ilin, se mi asertus, ke senkonscia rasismo inspiras tiujn dirojn, tamen... relegu la ĉi-supran difinon el P.V., kiu malbonsance aperis samtempe, kiel pluraj ĉefverkoj de Luiz Armstrong kaj Duko Ellington!

Tial mi elektis soci-muzikan temon kiu, ŝajnas al mi, intime rilatas al

nij priokupoj. Mi tute ne intencas pritrakti la historion de ĵazo, sed montri, kiel en ĝia evoluo enkorpiĝis la sufiĉe rapida metamorfozo de subpremita popolo. Kaj ĉar tiu homgrupo estas originala, ankaŭ ĉar ĝia arto profunde influis la modernan kulturon, ne nur en Usono, sed en Eŭropo, mi esperas, ke tiu skizo prezentos ioman intereson por laboristaj esperantistoj, eĉ se ili aparte ŝatas, nek entutan muzikon, nek ĵazon.

Kaj nun iom da bluso!

La bluso aparte gravas, ne nur dank' al propra signifo, sed ĉar ĝi kondukis de rudimenta unuvoĉa kanto al instrumenta komponaĵo, fine al ellaborita ĵazo, kies evoluon ni nun sekvas.

Komprenoble, laŭmezure kiel ĵazo malproksimiĝas de folkloro por atingi stadion de konscie polurita arto, oni ne plu povas pretendi ĉion klarigi per socia fundamento; kiel en ĉiuj artoj, la individuaj kapabloj ludas kreskantan rolon.

Decidiga estas la interveno de majstroj, kiaj Luiz Armstrong, D u k o Ellington, Karlo Parker.

Sed la unuaj balbutoj de ĵazo en Nov-Orleano pitoreske ilustras la

vivcirkonstancojn en tiu regiono. Altiu granda haveno alfluis diversaj influoj, francaj, hispanaj, afrikaj kaj karaibaj, kiuj kunfandiĝis en originalaj festoj, kiel la dancoj de Kongo-Placo, la funebraj fanfaroj akompanantaj la mortinton kun trista melodio, sed revenantaj kun sinkopa, pli vivgaja repertuaro. Inter la buboj, kiuj ignoris la lernejon por kaprioli preter la funebrantaro, plejble bruegantaj per ĉiuspecaj muzikiloj, enviciĝas pluraj el la baldaŭaj famuloj.

La pionira ĵazo disvolviĝas proksime de la ladkvartalo loĝita de negroj, ĉefe en la bordela kvartalo oficiale limigita de urbkonsilanto Story, pro tio nomita Storyville. En la baloj furoras la ragtimo de pianistoj, kaj sur la placoj tondras sonoraj bataloj inter la plej famaj orkestroj, kie regas Freddie Keppard, Bunk Johnson, kaj super ĉiuj la barbiro Buddy Bolden....

* La difino en la PIV estas tute alia!



Emblemoj

La kolombo kaj ties ŝtelo



Laŭ la raporto pri referendumo (p.5), ricevis pli da poentoj la ĉi apuda projekto, kiel emblemo de SAT-Amikaro.

Mi estis surprizita kiam mi vidis ĝin en la listo de la

dek proponitaj por la fina baloto farita per la referendumo, ankoraŭ pli surprizita, kiam mi eksciis ĝin sukcesinta.

Mi tute ne kritikis laŭ estetika vidpunkto: la konkursa regularo precizigis ke la gajnantan bildon oni grafike fajlos poste, laŭbezone. Do mi supozas ke ĝi plibeligiĝos.

La bildo montras kolombon kiu forflugas, kunportante stelon (verdan en la kolora originalo) kun la subtitolo: «ESPERANTO langue de la paix». Do jen sendube, kolombo simbolo de la paco, kiu fuĝas kun la verda stelo, simbolo de Esperanto. Kolombo ŝtelis la stelon, kaj nun Esperanto ne plu estas ĉies posedaĵo, sed ja de paco.

Aĥ! Ja ambigua estas tiu «de» kaj en Esperanto kaj en la franca. Imagu ke estus sukcesinta la celo de kelkaj, kaj ke Eŭropo oficiale uzus Esperanton. Kion vere signifus «Esperanto, lingvo de Eŭropo»? Aŭ ke ĝi uzas ĝin oficiale, aŭ ke ĝi ĝin posedas, aŭ...ambaŭ!

Per slogano kia «Esperanto, lingvo de (io ajn)», ja oni devojigas la ideon de neŭtraleco de la lingvo. Eble iom malpli ambigua estus slogano kiel «Esperanto, por la paco» aŭ «Esperanto, al pli paca mondo»

Tamen, eĉ kun tiu nuanco, la bildo tute ne bildigas SAT-Amikaron, kiu tute ne propagandas Esperanton kiel lingvo por la paco, sed kiel lingvo por senlima kulturo – kio tute ne signifas, ke ĝi malŝatas pacon. Tio estas tiom neadekvata kiom ekzemple se asocio kontraŭ la malsato en la mondo emblemus per kontraŭ-aidosa bildo.

Cetere, ĉu oni komprenu ke «paco» inkludas «socialan pacon»? Ja SAT-medioj havas kiel celon batali kontraŭ maljustaj socialaj sistemoj, kaj ĝuste elektis Esperanton kiel ilon ebligantan tiun batalon...

Kaj oni povas sin demandi, ĉu vere Esperanto estas (aŭ estu) lingvo de la paco en ĉies mensoj, vidu:



Rekrutece...

En la laste aperinta UEA-revuo «Esperanto», troviĝas artikolo pri KER-ekzamenoj subskribita de Katalin Kováts, bildigita per la rekrutiga vinjeto represita ĉi-supre, live. Oni facile rekonas la emblemon uzitan (ĉi-supre dekstre), ne aparte porpacan...

Serĝo

Kontribuo al vikipedio

La verko de la Pariza Komunumo.

Dum 72 tagoj, la Komunumo ellaboris kaj komencis uzon de la demokratia, sociala, humana verko kies moderneco, ankoraŭ alparolas nin, tiam post 140 jaroj, post printempo 1871.

1/ Aŭtentika demokratio:

Elektitoj obeemaj al nepra mandato, eksigeblaj kiam ili ne alkonformiĝas al siaj devigoj.

2/ Sociala agado:

Redukto pri laborodaŭro, en metiejoj de armiloj.

Abolo de noktolaboro en panejoj.

Nuligo de monpunoj, kaj salajrareduktoj.

Kooperativaj mastrumadoj en laborejoj forlasitaj de posedantoj (antaŭsignoj de memadministrado).

Senpagaj iloj kaj kuiriloj deponitaj en pruntoficejo.

Restarigo de moratorio koncerne luprezon kaj pagdatojn.

Rekvizicio de neokupitaj loĝejoj.

Kreado de dungoficejoj.

3/ La virina emancipado:

Kreado de unua popola feminisma organizo- Unuiĝo de virinoj por defendo de Parizo, kaj kuracado favore al vunditoj.

Salajra egaleco inter instruistinoj kaj instruistoj.

Divorcorajto, kaj konkubeco.

Kreado de virinaj memadministrataj laborejoj.

Starigo de profesia lernejo por junulinoj.

En kelkaj distriktoj, virinoj laboras pri municipa mastrumado.

Lukto kontraŭ prostituado, rigardata kiel formo de komerca ekspluatado de « homo far homo ».

4/ Eksterlandanoj, kompletaj civitanoj.

Eksterlandanoj, multnombraj partoprenas en la Komunumo, inter ili belgaj kaj luksemburgaj laboristoj, polaj revoluciuloj, garibaldianoj.

La Komunumo konfidis al ili gravajn responsojn: Leo Frankel servas kiel ministro pri laboro. Ankaŭ la polaj generaloj Włobewski kaj Dombrowski.

La komunumo estas por internaciismo, kaj elektas ruĝan flagon, flagon de universala Respubliko.

5/ Dispartigo de eklezio disde Ŝtato:

Dekreto de la 2a de aprilo 1871 (34 jaroj antaŭ la leĝo de 1905).

6/ Senpaga kaj laika lernejo:

Starigo en distriktoj far elektitoj kaj asocioj de nova edukado

7/ La kulturo:

La federacio de artistoj elektas arton sen registara kuratoreco.

Komunumo denove malfermas muzeojn, bibliotekojn, teatrojn, organizas koncertojn, en «Tuileries».

8/ Aliaj progresodecidoj:

Pensioj por edzinoj, aŭ kunulinoj, kaj infanoj de komunumanoj mortigitaj dum milito.

Proteste kontraŭ mortpuno, la gilotino estas bruligita..

El gazetarodosiero tradukita far Louis Gohin..

Maniero prirabi la trian mondon

La ekologiisma asocio *Les amis de la terre* (Tergloba Amikaro) malkovris dokumenton dediĉitan al la produktado de ercoj en Zambio. Tiu dokumento koncernas ekzamenon de la kontoj de la ekstraktista kompanio *Mopani Copper Mines* (MCM), kiu en la nombro de 70 procentoj estas filio de la svisa grandega firmao Glencore. Sekve de peto farita de la zambiana registaro, du grandaj kontokontrolistaj estaboj (francilingve *cabinets d'audit*) - brita kaj norvega - faris la koncernan ekzamenon en la jaro 2009.

Zambio estas membro de la Brita Regno (anglalingve *Commonwealth*) kaj havas limon komunan kun ok afrikaj regnoj: Angolo, Malavio, Mozambiko, Namibio, Demokratia Respubliko Kongo, Tanzanio, Zimbabvo, Bocvano. Ĝi kovras 752 614 kvadratkilometran areon kaj ĝi entenas proksimume 12 milionojn da loĝantoj. La subgrundo de Zambio estas riĉa je kupro, karbo, zinko, kobalto, oro, smeraldo, arĝento, kadmio, gipso, mangano, nafto, sed la loĝantaro estas tre malriĉa.

Malgraŭ la lokaj resursoj, la kompanio MCM havas mizeran profiton, kiu ebligas pagi malaltan imposton al la zambiana ŝtato. Tamen en la jaro 2008, tiu kompanio ricevis de la Eŭropa Investa Banko (francilingve *Banque européenne d'investissement* - BEI) 48 milionojn da dolaroj, por interalie ripari sian tubaron. Fondita en la jaro 1958 en la kadro de la Roma Traktato, la banko pretendis, ke la koncerna subvencio rilatas al la mineja sekurigo, kiu fariĝis prioritato laŭ decido alprenita de la Eŭropa Unio en la nuntempo, kiam okazas tutmonda hastego al ercoj regata de ĉinaj entreprenoj.

La kompanio MCM vendas por tre malaltaj prezoj sian kupron kaj sian kobalton al la firmao *Glencore*, kiu estas instalita en la svisa germanlingva kanton Zug (francilingve *Zoug*), kie la fiska reĝimo estas tre favora al la komercaj societoj. La firmao *Glencore* surmerkatis por multe pli altaj prezoj la tunojn da kupro kaj kobalto disponigitajn de la kompanio MCM, kaj tiel kontribuas al la fakto, ke Svisio troviĝas inter la ĉefaj produktantoj de tiuj ercoj en la mondo.

Jean Selle

Noto. La elementoj de tiu artikolo fontas el teksto aperinta la 9-an de februaro 2011 en la semajna gazeto *Le Canard enchaîné*, sub la titolo *Des Zambiens sous tous rapports (d'audit)*, kaj kompletigita per informoj el la enciklopedio Quid 2007.

Selle humuraĵo

Kapitalisma erara rondo

Mi rekonas lin. Antaŭ tri semajnoj, li maldungis min!

Probable, li havas brilan kariertabelon



La Sago 73. Marto 2011 p11

HuMorelaj Linioj... La Sago ekenketas pri medikamenta afero

Multaj legantoj de la Sago petas de ni klarigojn pri bonaj malbonaj medikamentoj ĉefe la U.K. (Universala Kuracilo) de la laboratorio I.S.F.

Do, nia kunlaborantino Lina renkontis la Direktoron de tiu apoteka laboratorio.

L: —Sinjoro, ĉu I.S.F. signifas «*Impot Sur la Fortune*» (Imposto sur riĉeco)?

D: —Evidente ne; nur «Internacia Sukceso Farmacie»

L: —Televide, ĵurnale oni raportis ke tiu medikamento mortigis kelkajn malsanulojn, eble 3 laŭ vi, eble 2000 laŭ aliaj. Ĉu vere?

D: — Mensogo! Mensogo! La homoj mortis pro nutraĵo, gripo, poluado, akcidento, k.t.p....

Lin' Morel'

Responde al Lin' (Vidu La Sagon 72)

Prezidenteco

Mi ĝojas, ke Lin' prezentiĝis, kiel esperantista kandidato por la Prezidenteco. Mi alte estimas ŝin, kiu plenigis mian teleron en krudeta Franca Kultur-Centro. Luj el ŝiaj programoj estas tre konvenaj. Tamen, neniu rajtas sole taksu sin la plej taŭga por reprezenti nin, Esperantistan minoritaton antaŭ la nacioj. Vi devos vigle kampanji en Esperanto, ni devos voĉdoni esperante. Aliaj eminentuloj eble estas pli spertaj. Seskorda gitaro ekzemple superas mandolinon kurtkordan. Mi gardas por polemiko la fakton, ke ili estas kvarope duoblaj.

Laŭ mi, la plej bona kandidato estas la kasisto ĉar kie kuŝas la mono, tie staras la potenco. Malbonŝance, li devas prudente pripensi, ĉu finplenumi la nunan mandaton en malproksima lando daŭre prosperante en la financoj, aŭ riski sian karieron necerte kontraŭ la ĉarmo kaj verveco de Lin'.

Kandidato Lin' tre prave elektis laŭkompetentece la ministrojn.

Vinko certe havos precizan

L: —Sed, pro la nepermeso de la «prisana ministro», la apotekistoj ne povas vendi ĝin.

D: —Jes, tamen, antaŭe, la ministro diris nenion al mi. Kial li agas tiel nun? Mi petas monon al li ĉar li ruinigas min kaj miajn akciuojn, kiuj multe grumbblas.

L: — Malfeliĉa viro, kion vi faros?

D: —Mi vendos U.K.-on rete en afrikaj aŭ aziaj landoj. Tie la loĝantoj ne komprenos la informojn de la uzindikoj. Mi amikumas la kuzinon de ministro. Do, li aĉetos U.K.-on kaj metos ĝin kun la H1N1 vakcino en la rezervo. Oni, ankaŭ, ŝanĝos la skatolon kaj la nomon; do la kuracistoj, denove, preskribos ĝin.

L: —Sinjoro, viaj proponoj ŝajnas al mi neonestaj. Ĉu vi ne havas memproponojn?

D: —Ne. Mi devas konservi mian laboron kaj tiujn de miaj kunlaborantoj. Mi dubas pri la enteno de via artikolo. Diru al mi kion vi skribos.

L: —Sinjoro, aĉetu la Sagon, vi scios.

vidpunkton tra la mikroskopo sed ĉu la vidkampo estos sufiĉe larĝa?

Serĝo povos aldoni unu koloron al sia paletro kaj Flora kapablos redakti dekretojn anstataŭ receptojn.

Vito kiel gorilo? Imagu la klaĉon! Se estas unu gorilo en Francio, ĝi kuras sur la rugbeaj sportejoj por meriti sian mizeran salajron.

Lin', vi devas bridi vian nunan ambicion kaj saĝe atendi ĝis kiam la Esperantistaro estos elektinta la popolajn kandidatojn por la kandidateco. Neniu ĝis nun, krom vi, deklaris sian intencon sed kelkaj talentoj potencialas. Ni atendu.


Skibante, iom kritikeme, mi pli kaj pli flamiĝas kaj firmigas mian konfuzan opinion, ke estos vi la plej bona. Poezio superas raciecon. Kuraĝu Lin', mi donos al vi mian voĉon (en Ansofia staĝo) kaj subtenos Ĝenovevon, kiel helpanto, t.e. ministro pri Ekonomio. Mi verse verkos vian biografion. Belvoĉa sveltulino havas argumentojn por plektri sur niaj koroj kaj venki kontraŭ financistoj kaj nenifarantoj. Sed kiu kuiras en Kvintelero?

Klod'

Nova ekocentro dulingva en Piktavio

Ekozofia Angulo


La nuna tendenco por «savi la planedon» ofte konsistas en verdigo de



Alia progresado estus ŝanĝi la vidpunkton laŭ ekozofia irado. Tion vi povos spekti, kompreni kaj eĉ sperti en ekocentro. En Venio (86), 60 km norde de Kvinpetalo, en mia kara vilaĝo Seniljeo (Senillé) mi starigos sur duonhektaro de malbonkvalita grundo tri forcejojn por kompari nesimilajn solvojn. La unua estos kutima forcejo por legomkulturistoj kun metala ĉarpentaĵo kaj molplasta maldika koverto. En tiu forcejo mi kultivos spirulinon, tiu famiĝanta mikroalga -sennuklea cianobakterio fakte- kiu provizas nian planedon per oksigeno de jam antaŭ pli ol tri miliardoj da jaroj. Tiun kulturadon raciigis usona firmao laŭ la kemia vidpunkto. La

niaj kutimaj solvoj: aldoni sunkaptilojn al ordinaraj domoj, konstrui gigantajn ventgeneratorojn, uzi manĝeblajn cerealojn por nutri niajn nesateblajn aŭtojn, virtualizi nian mondon dank' al tuŝosentaj ekranoj, ktp. La homaro jam konsumas ĉiujare pli ol nia blua planedo povas produkti. Resalti pere de teknologio ne ŝanĝas jenan fakton: la senĉesa konsumado de fosiliaj resursoj enŝovigas nin en novan geologian eraon, la antropoceno.

bioklimata forcejo.



Funkciado de la ekoforcejo

Norde de la konstruaĵo, taluso (1) kaj vegetala tegmento (2) protektos ĝin de la frosto. Pli supre lignaj tegoloj daŭrigos la ŝirmon (3). Sude branĉfaskoj da erikoj protektos la sudan fasadon dumsomere (4). La akvopluvo estos konservata por akvumado (5) kaj la elektran energion oni stokos en aparta ĉambro kiu utilos kiel varmizolilo (6).

La sunbrilo kiu eniros la forcejon tra larĝaj tegment-fenestroj reflektiĝos sur blanka ege izolita plafono (7). La suda parto de la tegmento ricevos sunkaptilojn por varmigi akvon kaj produkti elektron inter la fenestroj kiujn oni povos obskurigi per rulantaj ŝutoj (8). La travidebla fasado konsistas el du plastaj rigidaj platoj (9) inter kiuj oni povos enblovi vespere korkokuglojn elĉerpitajn per speciala suĉilo el granda rezervujo sidanta en la teknika ĉambro (6). Matene oni inversos la blovdirekton por lasi la sunon varmigi la forcejon. La sunbrilo kiu eniros ĝisfunde dumvintre restos en la fronta parto dumsomere, kaj tiel oni konservos komfortan atmosferon en ĉiuj

sezonoj (10). Tamen kiam la varmo troos, aersuĉilo (11) enŝovos ĝin en stakon da rondaj ŝtonetoj sub la konstruaĵo kaj redonos ĝin kiam fridos (12).

La vizitgalerio kun travideblaj slaboj utilos por kompreni la funkciadon de la tuto (13). Je tiu nivelo sidos ankaŭ plantsekigilo (14) kaj ĝermejo por produkti manĝeblajn semojn (15). Je la teretaĝo oni trovos kompoŝtilon por kreskigi plantojn dank'al la varmo kaj la karbondioksido produktitaj de fermentanta ĉeval-sterkaĵo stokita en rulantaj tamburoj (16). Post kelkaj semajnoj kiam la tamburo finos sian trairon, oni plonĝos ĝin en alian fermentujon kiu produktos biometanon (17). Tiu gaso utilos por hejtado kaj elektro-produktado. Karbondioksido kaj amoniako eltiritaj de tiu fermentado nutros la spirulinon, kiun travidebla Arkimed-ŝraŭbo kirlos malrapide por plibonigi la produktadon (18). La sedimentiĝonta ŝlimo nutros fiŝojn (19).

naturan procedon oni paŭzas en larĝaj kaj neprofundaj basenoj. Ĉiutage oni aldonas post la matena rikolto certan kvanton da kemiaĵoj por anstataŭigi la forigitan vivantajon.

En mia onta bioklimata forcejo mi provos reprodukti kiel eble plej fidele la naturajn kondiĉojn de intertropikaj laĝetoj en kiuj kutime kreskas tiu vivantaĵo. En la afrikaj laĝetoj, kie reproduktiĝas plej efike la spirulino, etaj flamenoj (Phoenicopter minor) per siaj piedoj kaj fekaĵoj ebligas la disvolvadon de sia ĉefa nutraĵo.

En la ĉi suba bildo vi povos imagi la funkciadon de la bioklimata forcejo.

Apud la tri kolonoj de la ekodisvolvado (ekonomio, ekologio, sociaj ligoj) mi aldonos la decidmetodon laŭ nehierarkia kaj kolektiva inteligenteco, kiun iuj nomas sociokratio kies modelo estas vivanta organismo. Tiun logikon oni provu kiam la funkciado de entrepreno lamas. Tial mi alvokas ĉiujn elturniĝemulojn helpi al la konstruado de tiu nova arkeo por sperti ekozofian vivon (la saĝeco en nia komuna domo). Por ricevi inviton al la ekofesto dimanĉon la 19 an de junio aŭ peti pliajn informojn, bonvolu skribi al la iniciatanto:

Bernard Lagrange,
12 rue du Berry – 86100 Senillé
Poŝtel. 06 63 45 64 16

(Daŭrigota)

El nia leterkesto

Pro la sanstato de Kribo, ties eldonanto, la revuo *Laŭte!* ne plu povas aperi. Mi ŝatus kontakti la legantojn de tiu revuo kiuj havas retadreson, por vidi ĉu eblas pluivigi la komunumon alimaniere per miksitaj reto (elektronika+papera), kaj eventuale iel aperigi ion.

Bonvolu dissendi tiun mesaĝon al konataj gelaŭtuloj

Antaŭdankon

Amike,

JeanSeB
jeansebo@yahoo.fr

Kribo antaŭ sufiĉe longe forlasis SAT-Amikaron pro konflikto kun la tiama estraro. Tiu estraro malaperis kaj la nuna montras nekontesteban evoluon. Tutcerte, Kribo nun volonte reaniĝus se lia sanstato ne flankenigus tion...

Ja *Laŭte!* estis gazeto kies nivelo ege varias de perloj al perpleksaĵoj tra petolaĵoj... sed tamen havas tiun nediskuteblan econ: liberan esprimilon.

Paralele al *Laŭte!*, oni ne preterlasu la egan laboron de Kribo por sia SAT-Broŝur-servo kiu entenas neperdindajn trezorojn. Vidu tiurilate la kontribuon de Ĵak p. 9

Serĝo

L'excellent et inévitable rédacteur en chef oublie de préciser son adresse... à la Sago.

Juste un petit mot pour répondre à REAGU page 3 n°72 La Sago.

J'ai été agréablement surpris par : «L'espéranto, comment ça marche?» page 10. Je mettrais facilement fonctionne ou s'articule à la place de marche.

Page 11 et 12, la rubrique de Andrio est certainement utile.

Le bilinguisme actuel est tout à fait convenable et facilite l'attrait à l'E°.

Les notes en page 2 gagneraient à être plus nombreuses.

Jean-Paul Moyon (44 St-Nazaire)

La pétition actuellement mise en place, est une excellente initiative (page 8 du supplément en français, La Sago 72, février 2011).

Dans cette publication francophone, il pourrait être ouvert une rubrique permettant de réfléchir à une méthodologie destinée à convaincre les décideurs institutionnels pour l'adoption de l'espéranto.

Bien entendu, il est vivement souhaitable que le lecteur de base participe à sa rédaction.

C'est ma suggestion.

Jean-Paul Moyon (44 St-Nazaire)

Nous ne pouvons qu'appuyer cet appel à la participation des «lecteurs de base» ! NDLR

Le Mouvement
en mouvement...

Interview de Daniel Moirand



- SFS (Sudfrancia stelo : Bulteno eldonita de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono) : Pourquoi avoir choisi «Les Mille et Une Nuits» ?

- DM (Daniel Moirand): Quand j'étais étudiant à l'université d'Aix en Provence, j'ai suivi les cours d'arabe classique pendant plusieurs années. Ceci en soi était déjà une approche du monde arabe. De surcroît, l'un de mes manuels d'études consistait en une série de textes arabes destinés à la traduction. Tous ces textes étaient issus de diverses parties du livre des Mille et Une nuits. Ces récits m'ont laissé depuis cette époque lointaine (un demi-siècle déjà !) une impression ineffaçable : le merveilleux y transparaît à chaque pas et c'est précisément pour retrouver (et faire partager) cet élément que je me suis attelé à cette traduction, longue, certes, mais tellement passionnante !

- SFS : Par rapport à vos traductions précédentes: «Le livre des Merveilles» et «Le Comte de Monte-Cristo», avez-vous rencontré des difficultés?

-DM : Il faut dire que la traduction de l'original arabe faite en français par Antoine Galland au tout début du 18-ème siècle est d'une limpidité parfaite. Seules quelques tournures ou expressions inhérentes à la langue française de cette époque, peuvent, à la rigueur, poser quelques problèmes techniques.

De plus, mes études de langue arabe m'avaient bien préparé à ce monde particulier. Par ailleurs, plusieurs années passées dans le monde oriental m'ont grandement aidé à saisir certains aspects spécifiques de la vie et des coutumes évoquées, et à en redonner l'essence dans la traduction en espéranto.

La traduction du Comte de Monte-Cristo a été plus ardue en raison du caractère beaucoup plus littéraire du livre.

-SFS: Y-a-t'il des spécificités d'une traduction à l'autre ?

-DM : Il va de soi que chaque texte à traduire comporte des éléments spécifiques qu'il faut essayer de

rendre dans la traduction. Ainsi, pour Monte-Cristo, il est certain que de nombreux termes de civilisation décrivent une réalité disparue à notre époque : il faut quand même essayer de les rendre au mieux sans trahir le texte.

- SFS : Quelle traduction vous a posé le plus de problèmes ?

-DM : Sans doute la traduction du livre de Marco Polo a été la plus délicate car il touche toute une série «de mondes» : monde turc, monde mongol, monde chinois, pour lesquels j'ai dû affiner mes connaissances. Mais comme mes études de langues m'avaient poussé dans ces trois directions, j'espère quand même avoir pu rendre au mieux ces divers aspects orientaux.

Il n'aura pas échappé au lecteur attentif que le livre des Merveilles fait le pendant au Merveilleux rencontré dans les Mille et Une nuits. Cet aspect «merveilleux» sous-tend les deux ouvrages dont j'ai assuré la traduction: l'enfant et son imaginaire ne perdent jamais leurs droits en dépit de l'âge !

-SFS: Avez-vous pensé à une souscription, puisque votre traduction est finie depuis deux ans?

-DM : Le système d'édition des livres en Espéranto n'a jamais fait appel, du moins à ma connaissance, au principe de la souscription. Dans l'ordre, il convient de suivre la démarche suivante:

- proposer un texte décentement écrit et présenté.

- faire relire et réviser le texte traduit (de préférence par un non-Français) de façon à éviter les gallicismes involontaires et incontournables. Dans le cas qui nous concerne, l'original comporte 1.200 pages, la traduction comporte six cahiers reliés de 100 pages (A4) chacun. Faut-il

Le forum de Dakar bat son plein ... et l'on s'y bouscule

Le Forum social mondial au Sénégal a un programme trépidant d'ateliers, séminaires, tables rondes et manifestations culturelles, et a doublé la population du campus universitaire de la capitale.

Aujourd'hui, des migrants, des petits pêcheurs et des participants du Forum social mondial convergent dans les rues et sur la côte près des services du dispositif Frontex⁽¹⁾ à Dakar, au Sénégal, pour une manifestation contre l'Agence des services frontaliers de l'UE. Les organisateurs de la protestation disent que les patrouilles frontalières opérant au large des côtes du Sénégal et de la Mauritanie obligent les pirogues à retourner vers le large, ce qui représente un risque pour les migrants qui cherchent à se rendre en Europe et pour les pêcheurs locaux qui tirent des eaux côtières leur subsistance.

«Depuis 1993 au moins 14 000 personnes ont perdu la vie sur les frontières extérieures européennes», disent-ils, en critiquant les conditions économiques qui obligent les migrants à chercher une nouvelle vie à l'étranger, tout en réclamant «le droit de se déplacer - et de rester».

Les migrations et les mouvements de population sont un thème clé du Forum social mondial de cette année, ainsi que le rôle croissant des pays du «sud» et la géopolitique en évolution des relations sud-sud. Arguments et idées pour des modalités et des objectifs de «développement» différents emplissent l'air doux et chaud de ce mois de Février à Dakar.

L'université Cheikh Anta Diop de la ville, qui accueille le forum, a vu sa population exploser du jour au lendemain. Le vaste campus abrite environ 80.000 étudiants: une ville dans la ville. Le forum amène 75 000 participants supplémentaires.

«La mobilisation ici à Dakar est au-delà de toute attente», a déclaré mercredi l'un des organisateurs du forum. L'envergure extrême prise par ce forum montre non seulement la dynamique du slogan «un autre monde est possible» mais met aussi à l'épreuve en relief les limites de la structure actuelle, ajoute-elle. Il faut davantage de forums locaux et régionaux, intervient un autre organisateur, pour compléter l'édition mondiale et approfondir le mouvement contre la «mondialisation dans l'intérêt du capital».

Le forum de cette année est organisé autour de trois axes stratégiques, portant sur l'analyse critique du système économique actuel, sur les stratégies de lutte et de résistance, et sur les alternatives démocratiques et populaires pour un «monde en crise».

Le rythme est rapide, au cours des deux derniers jours, 1200 ateliers, séminaires, tables rondes et manifestations culturelles ont submergé le campus, avec des centaines de réunions informelles.

Les participants au forum représentent plus de 132 pays - tout le monde, depuis les associations de petits agriculteurs de l'ouest africain jusqu'aux grandes ONG basées à Londres, semble être ici. Au cours des premiers jours du forum, de longues caravanes de participants affluaient à Dakar, amenant des groupes de l'ouest et du centre de l'Afrique - du Mali, du Togo, du Bénin, du Cameroun et de la République démocratique du Congo.

Alors que je m'arrête pour déchiffrer une multitude d'affiches multilingues - en français, arabe, espagnol, portugais, anglais et autres - une petite femme aux cheveux argentés se fraie un chemin à travers la foule. Son T-shirt noir arborant une image de la Terre et les mots: «Esperanto es mia lingva» (l'espéranto est ma langue)². La multitude des langues donne au forum un sentiment dynamique de la mondialisation - ainsi que des énormes défis de la communication. Une équipe d'interprètes et de traducteurs ont fait une descente sur le forum, rassemblant sous leurs ailes de petits groupes de personnes unilingues, faisant de leur mieux pour arriver à comprendre quelque chose dans ce bavardage multilingue.

Pendant ce temps, il y a dans l'air une controverse plus pesante: quel est le rôle de l'idéologie dans le forum? Est-il temps pour le Forum social mondial d'adopter une position politique plus cohérente? Jusqu'à présent, le forum a été organisé autour du principe d'offrir un «espace ouvert» pour la discussion, la convergence et la création d'alliances. Mais la présence au forum de certains intérêts privés - une compagnie pétrolière brésilienne, par exemple - et une scission entre ceux qui cherchent à réformer le marché et ceux qui cherchent à élaborer des stratégies de «dé-marchandisation» ont amené de nombreux participants à se demander si le principe de l'«espace ouvert» n'a pas déjà atteint son point de rupture.

Traduit de l'espéranto par JoLoKo...

(1) Frontex (Agence européenne pour la gestion de la coopération opérationnelle aux frontières extérieures) est l'agence européenne pour la sécurité des frontières extérieures de l'Union européenne. Son siège est à Varsovie.

(2) Voir en première page, l'article de la «petite femme aux cheveux argentés» NDLR



L'espéranto se répand bien en Béarn !

L'association paloise «Langue Espéranto 64» s'est «retroussée les manches» avec succès.

En effet, après la tenue de deux conférences à Pau (9 et 12/2010), cette association à:

- organisé une exposition (3 semaines en 01/2011) ponctuée d'une nouvelle conférence à Oloron Sainte-Marie (64).

- participé au salon du livre de Navarrenx (64), à l'occasion de sa grande foire agricole annuelle et y aura, là aussi, tenu une autre conférence (01/2011)

- accepté de participer à «La semaine de l'espéranto» organisée par l'association de Mont-de-Marsan(40) (exposition et conférence). (3/2011)

- accepté de présenter l'espéranto à la très dynamique médiathèque de Gurmençon (64) (3/2011).

- été contactée pour une nouvelle présentation à l'université du temps libre de Pau en fin d'année 2011 ainsi que par d'autres associations culturelles.

Il va de soi que ce déploiement d'activités à éveillé un grand nombre de personnes à «la solution» que nous proposons: ainsi, un cours d'initiation a été structuré pour un noyau de 10 personnes à Pau et de 6 personnes à Oloron.

Par ailleurs, de nombreuses demandes et relances pour l'obtention de «premiers signataires» concernant la pétition pour «l'espéranto en option au bac» ont été formulées: il s'avère en effet que les «relances» sont nécessaires et servent, en outre, à la visibilité de notre mouvement. L'association «Espéranto 64» encourage donc toutes les associations régionales et locales à faire de même auprès de leurs ministres et parlementaires.

Guy Camy

■ **Info-Chalon.com** publie Mardi 08 février 2011 un article sous le titre assez curieux «*L'espéranto, poule aux œufs d'or de Jocelyne Monneret*»⁽¹⁾

L'article n'est pas un modèle de style, mais pour une fois, il résulte d'une demande spécifique de l'organe de presse, et non de l'envoi «militant» d'un espérantiste...



Jocelyne y aborde les thèmes :

- **Une langue dont la propriété première est d'être universelle** : «C'est une langue universelle, elle est équitable»

- **Pas un jeu d'enfant, mais pas loin** : «A âge égal, et à nombre d'heures égal, les apprentis espérantistes obtiennent en six mois une capacité de communiquer qu'ils auraient en anglais au bout de six ans !»

- **Quelle soit prise en considération dans les écoles** : «si c'était possible de l'enseigner dans les écoles, au même titre qu'une autre langue, ce serait très bien.» Et l'espéranto au bac : «Comme en Hongrie, le seul pays d'Europe où il est en

option dans plusieurs examens»

Voir l'article complet:
<http://www.infos-chalon.com/article.php?sid=23609&thold=0>

Sergo
d'après un communiqué de Jocelyne

(1) car en fait de «poule aux œufs d'or», l'enrichissement qu'elle en tire n'est qu'essentiellement intellectuel !

Bretona regiono. Informado pri Esperanto, tie, kie vivadas la junuloj



La 11an de januaro ni travivis nian unuan sperton por informi la junulojn en la «Hejmo por junaj laboristoj» (HJL) en Dinan (22). Ok tagojn pli frue ni afiŝis ekspozicion por motivi la junulojn. Vincent, juna esperantisto en Dinan, akompanis min.

La gvidisto esperis 5 ĝis 10 junuloj, Ni kalkulis 19 junulojn, 3 gvidistojn kaj triopa familio.

Vincent preparis kelkajn lumbildojn por prezenti la lingvon kaj ni spektis la unuan ĉapitron el la DVD «Esperanto estas».

La ĉeesto de Vincent faciligis la renkonton kun lernejoj kolegoj.

La junuloj starigis taŭgajn demandojn: Kiu kreis la lingvon? Al kio ĝi utilas? Kiel ĝi estas konstruita? Sed kial do la lingvo ne estas pli diskonigita? Ni invitis ilin eniri la esperantujon.

La gvidisto haltis la interŝanĝon ĉar la junuloj havis multajn demandojn kaj iuj junuloj devos ellitiĝi frue matene. La renkonto daŭrigis de la 20a ĝis la 22a.

La 8an de februaro, similan prezentadon ni proponis en unu San-Briega HJL. Dum 2 horoj, 15 junuloj kaj 2 gvidantoj partoprenis kaj ludis per radikoj, afiksoj, ekparolis esperanton kaj tuj nombris.

Ni proponis starigi kurson surloke; ni baldaŭ scios ĉu kelkaj junuloj daŭrigos sian malkovron. Nur unu jam sciis ke Esperanto ekzistas pro lingva ebleco en Ubuntu! Rimarkinda ĉeesto de tri kongolandanoj, kiuj ege interesiĝis. Gvidanto kredis ke Esperanto estas malnova fiaska projekto sed miris kiel facile la junuloj tuj provis paroli kaj vidi junajn esperantistojn en DVD kaj aŭskulti kantistojn per KD...

Jam en Dinan, grupo da 10 junuloj petas la klubon organizi kurson!

Venontmonate, ni rekomencos en alia HJL en San Briego, kun multaj eksterlandanoj.

Ni instigas aliajn SAT-amikaranojn proponi similiajn agadojn en laborista medio en sia urbo.

Ne hezitu kontakti nin por pliaj informoj.

Philippe Stride philippe.stride@gmail.com
kaj Guy Martin guymartinguy@gmail.com

Plu moviĝas
la Movado...



Je la 19a de Februaro, okazis en Ketinio (sub-urbo de Dijono) tuttaga kurso kiu kunigis 60 homojn el kiuj 5 infanoj kaj 5 adoleskantoj. La kurso por komencintoj estis gvidata de Jean-Luc Kristos kiu famas ĉar li animas tre ŝatatajn kursojn en Greziljono (per aktivaj metodoj). Lokaj instruantoj animis la aliajn kursojn. Ĉio bone okazis kaj ĉiuj rehejmiĝis post agrabla tago en Esperantio: la vivo belas!

Kio estas «tuttaga kurso»?

De jam pluraj jaroj, ĉiutrimestre, la lokaj grupoj organizas ĉiusiavice tagon dum kiu estas proponataj plurajn kursojn: kursoj por komencantoj, komencintoj, progresantoj kaj ankaŭ kursoj por

infanoj kaj adoleskantoj (kiam eblas, oni proponas apartajn kursojn por infanoj kaj adoleskantoj).

Sed «tuttaga kurso» estas ankaŭ regiona renkontiĝo kaj la tagmeza komuna manĝo gravas almenaŭ tiom kiom la kursoj. Fakte, en granda salono, ĉiuj dividas la kunportitajn manĝaĵojn (kaj la kunportitajn trinkaĵojn, oni ne forgesu tion!). Tiuj kiuj jam partoprenis en «tuttaga kurso» ne forgesis tiun grandan momenton ... kaj eĉ, ŝajnas ke kelkaj pli ŝatas la manĝon ol la kurson: ĉu tio vere eblas?

La «tuttagaj kursoj» kunigas homojn el Bezansono, Ĉalon'-ĉe-Saono, Burg'-en-Bresio, Truajo (Troyes) kaj el Jurasio sen forgesi kelkajn aliajn inter kiuj Carlo Bourlot kiu preskaŭ ĉiufoje venas el Torino (Italio) por esti kun ni ...

La venonta «tuttaga kurso» okazos la 2an de Aprilo en Ĉatillon'-ĉe-Ĉalarono (01 Chatillon sur Chalaronne) kaj ni finos la lernejan jaron la 28an de Majo en Arbuazo (39 Arbois).

Daniel Biro

